Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 67, novembro-decembro 2023

Universala Esperanto-Asocio

Mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Tago de UN, 24 oktobro 2023

“Dum periodo kiam la internacia ordo estas serioze minacata kaj kiam la reguligo de la mondo laŭ juraj principoj kaj laŭ tolerema spirito estas severe kontestata, Universala Esperanto-Asocio, kiu kunigas parolantojn de Esperanto de ĉiuj naciecoj kaj kulturoj kaj de diversaj politikaj konvinkoj, salutas Unuiĝintajn Naciojn je la Tago de UN 2023.”

Per ĉi tiuj vortoj la Asocio komencis sian mesaĝon al UN okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj 2023. La formalaj rilatoj de la Asocio kun UN datiĝas de la jaro 1954, kiam la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis la kontribuojn de UEA al internacia kompreniĝo kaj kultura kunlaboro. La mesaĝo de 2023 aludas al tiuj fruaj tagoj de UN: “Kiam oni kreis Unuiĝintajn Naciojn en la jaro 1945, ĝiaj fondantoj celis forigi el la mondo la skurĝon de militoj. Kvankam tiu celo restas ankoraŭ neatingita, kaj kvankam maltoleremo, etnaj rivalecoj kaj ekonomia ekspluatado plue minacas la mondan bonfarton kaj tiel diversmaniere malhelpas multflankan kunlaboron, Unuiĝintaj Nacioj restas lumigilo de espero.”

“La espero,” deklaris la nuna mesaĝo, “estis tio kio inspiris Ludovikon Zamenhof krei Esperanton en la jaro 1887 kaj imagi al si alian mondon de etna kaj rasa toleremo. Depost tiu dato, Esperanto formadis tutmondan parolkomunumon – komunumon kiu celas igi la mondon loko pli bona.”

Lingvoj ne estas la sola demando kiu malhelpas internacian kunlaboron, sed ĝi ja gravas: “Ni rekonas la fakton, ke superi lingvajn diferencojn kaj dume rekoni kulturan kaj lingvan diversecon konsistigas nur unu elementon en la antaŭenigo de la paco, sed temas pri grava elemento. Ni promesas nian subtenon al ĉiuj sinceraj klopodoj antaŭenigi pacon, kaj tute aparte la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj, organizo kiu tiel multe laboris por malhelpi militon dum nia epoko, antaŭenigi multflankan kunlaboradon, kaj memorigi nin pri nia komuna respondeco kiel homoj pri la estonteco de nia planedo.”

“Dum periodo kiam la mondo frontas danĝerojn ekzistominacajn,” plue deklaris la mesaĝo, “Unuiĝintaj Nacioj estas eĉ pli grava ol antaŭe. Ni volonte donas al ĝi nian subtenon kaj instigas ĉiujn aliajn samon fari.”

Komentante pri la mesaĝo de la Asocio, reprezentanto de la Asocio al UN, prof. Humphrey Tonkin, aldonis: “Multaj niaj membroj loĝas en militaj zonoj, aŭ mem partoprenas militan agadon, aŭ suferas rezulte de malpacaj agadoj. Apenaŭ temas pri tiu mondo antaŭvidata en 1945, kiam UN fondiĝis. Ni ĉiuj devas labori pli multe, kaj labori pli bone, por solvi disputojn pace kaj respekti unu la alian. Ni estas dankemaj al Unuiĝintaj Nacioj pro tio kion ĝi faras, sed ni ĉiuj devas intensigi niajn klopodojn kaj igi ilin pli efikaj.”

La Esperanto-movado funebras la forpason de Martti Ahtissari

Martti Ahtissari, iama Prezidento de Finnlando, konata al esperantistoj kiel Honora Protektanto de la Universala Kongreso de Esperanto en Tampere en 1995, mortis lastatempe post longa malsano. Estimata pro sia sindediĉo al egalismo kaj justeco, kaj pro siaj senĉesaj klopodoj por antaŭenigi pacon, li ricevis en la jaro 2008 la Nobel-premion por Paco. Komentante pri lia forpaso, la iama prezidento de Irlando Mary Robinson laŭdis lin pro lia “sindediĉa insistado por solvi konfliktojn kaj antaŭenigi pli justan mondon.” “Liaj saĝo kaj firmeco,” ŝi aldonis, “inspiru nin duobligi niajn klopodojn akiri pacon en la nunaj profunde maltrankviligaj tagoj.”

En aŭgusto 1995 la tiama Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio Osmo Buller aranĝis, ke iamaj prezidantoj de la Asocio John Wells kaj Humphrey Tonkin vojaĝu al Naantali, la somera rezidejo de la Finnlanda Prezidento, por tie prezenti al li la Premion Zamenhof, la plej altan honoron de la Asocio, aljuĝatan al elstaraj pledantoj por internacia paco. Antaŭaj ricevintoj de la premio inkluzivas Sir Brian Urquhart, ĉefa arkitekto de la packonserva agado de Unuiĝintaj Nacioj en la periodo de la fondiĝo de UN, kaj Amadou Mahtar M’Bow, iama ĝenerala Direktoro de Unesko, la Organizaĵo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo.

Asocia revuo festas unu kongreson, rigardas al la venonta

La oktobra numero de la revuo de UEA retrospekte rigardas al la Universala Kongreso de Esperanto en Torino en aŭgusto, kiu allogis pli ol mil homoj el ĉiuj kontinentoj, kaj anticipas la venontan ĉefan eventon, la 4-an Virtualan Kongreson de Esperanto, okazontan de la 23-a ĝis la 26-a de novembro ĉi-jare. Aparte atentata en tiu ĉi numero estas honorigo de Miora Raveloharison, el Madagaskaro, ricevinto de la ĉi-jara Premio Deguĉi pro sia laboro por internacia paco. Profiloj de kvar aliaj premiitoj ankaŭ aperas: Katalin Kovats (Nederlando), Anna Löwenstein (Britio) kaj Privas Tchikpe (Benino), nomitaj de la Komitato de UEA kiel honoraj membroj, kaj Renato Corsetti, iama UEA-prezidanto, kiel honora prezidanto. En la sama numero troviĝas raportoj pri kongresoj de esperantistaj instruistoj kaj de Esperanto-junularo, kiuj okazis ankaŭ en Italio en aŭgusto. La venonta Universala Kongreso, la 109-a en la serio (la unua okazis en la jaro 1905), okazos en Aruŝo, Tanzanio, en aŭgusto 2024.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.